

VESPERTO



LITERATURA FOLIO

Numero: 218 .
Julio 2010. 18-a jarkolekto

Redaktanto:

Apáti Kovács Béla
Kaposvár
Béla király u. 44.
H-7400 HUNGARIO
Telefona: 82/ 410-664
Retadreso: espbela@t-online.hu
Eldonanto: Kaposvara Esperanto
Centro
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

La sezono de la kongresoj

En 1973 mi partoprenis mian unuan Esperanto-kongreson en la belega bosnia urbo Sarajevo en la tiam Jugoslavio.

Por mi tiu ĉi kongreso estas neforgesebla. Min ĉarmis la tiea atmosfero. Mi tute infektiĝis korpe kaj anime per la ideo de Esperanto.

Belegan semajnon ni pasigis en tiu ĉi urbo konatiĝante, interamikiĝante kun multaj eksterlandaj geesperantistoj. Vere tiam mi apenaŭ parolis Esperanton. Mi estis komencanto. Tamen jam en la unua momento mi sentis, min ĉirkaŭas ia, ĝis nun nekonata sento.

Knabo, kiu post sesjara lernado de la rusa lingvo ne povis komprenigi sin, nun flue parolas fremdan lingvon, kaj la diverslingvaj homoj komprenas lin.

Okazis miraklo. Mi trovis lingvon, kio orumis mian vivon kaj la tagoj pasis agrable kaj feliĉe en Sarajevo dum TEJO kongreso.

Poste mi ankoraŭ partoprenis multajn kongresojn, aranĝojn, sed la unua restos ĉiam la plej kara por mi.

Do mi instigas ĉiujn geesperantistojn, se eblas, tiam nepre vizitu tian kongreson kaj ne nur ĉe skribotablo Esperantumu! Spertu ĝian atmosferon ankaŭ en la praktiko! Mi garantias, dum iu Esperanto kongreso vi fariĝos vera esperantisto.

-Redaktanto-

Vortoj

El vortoj fariĝos frazoj. Ekzistas kelkaj vortoj, kiuj estas gravaj en nia vivo.

Malgranda vorto povas influi nian vivon.

Do, ni pripensu, kiu vorto estu uzata, ĉar kelkaj havas magian forton.

Ne. Ne, nun mi ne parolas pri sorĉoj, tiuj vortoj tie estas en nia ĉiutaga vivo.

Mi spertis, iu elbuŝigis sensignifan vorteton kaj ĝi kaŭzis gravan renverson en la vivo de la ĉeestantoj.

Ĉu oni devas timi de la vortoj?

Tion mi ne diris. Sed estas bone, se oni estas singardema kaj sentas la pezon de la vorto, kiu forlasas sian buŝon.

Per vortoj eblas esprimi amon, sed ĝi povas esti ankaŭ la fonto de la venĝo.

Multaj homoj kaŝiĝas malantaŭ la vortojn kaj parolas, parolas sekretante la verajn sentojn.

Se vi rigardis vortaron, ĉu vi jam pensis pri tio, kion diras al vi la vortoj trovitaj en ĝi.

Certe ne, ĉar ĉiutage vi uzas ilin kaj senrimarke vi preteriras ilin. Nature, ke ili ekzistas kaj ili helpas al vi esprimi viajn pensojn. Per vortoj vi povas komuniki.

Ĉiam elektu la ĝustan vorton kaj nur tiuj estu uzataj, kiuj estas nepre necesaj.

Tiu ĉi leĝo estas valida por ĉiu lingvo.

-Ŝaŝa-

Poezio

Mikaelo Ternavski

Koloro

Mi volus havi
tian mian
koloron
kiu dum elparolo
de mia nomo
aperus tiel nature
kiel la blanko –
ĉe la vorto neĝo
kiel la lazuro –
ĉe la vorto ĉielo
kiel la verdo –
ĉe la vorto herbo
... mi volus
havi
tian mian
koloron

HUMURO



-Karulo, demandu de ili, kie troviĝas la kongresejo de UK?

Aventuro

Noveleto

Emeriko vespere alvenis la urbeton. La stacidomo estis malhela kaj forlasita. Neniu estis tie krom vagabondo, kiu certe dormis en kaduka konstruaĵo. Eble iam ĝi estis bele prizorgita fervojista dometo.

Neniu atendis lin.

Verdire li ne sciis, kien iri. Vole nevole li devis demandi la vagabondon:

-Bonvolu diri en kiu direkto estas la centro de la urbeto?

La viro unue ne komprenis la demandon. Tial Emeriko devis ripeti.

Fine li elbuŝigis kun alkoholvaporo:

-En tiu direkto – li montris per tremanta brako dekstren.

Emeriko donis al li kvindek forintojn. La mono tuj malaperis en la ĉifona poŝo.

Li malrapide ekiris. Li kunportis nenion krom eta dorsosako.

Mallarĝa vojeto kondukis al la vilaĝo. Li iris proksimume dek minutojn ĝis li atingis la unuajn domojn.

La vilaĝanoj jam dormis. Por li estis nekutima tiu ĉi silento. La urboj ĉiam estas bruaj kaj maltrankvilaj.

En la vilaĝocentro la drinkejo estis ankoraŭ malfermita. Ene estis kelkaj homoj. La drinkejestro estis ege dormema, ĉar ofte li oscedadis. Prefere li jam sendus hejmen la gastojn.

Kiam Emeriko enpaŝis, ĉiu rigardis al li scivole, kvazaŭ ili demandus: „Kion volas ĉi fremdulo en nia vilaĝo?”

Kompreneble ili ne ricevas respondon. La alveninto rekte iris al la drinkejestro kaj demandis:

-Sinjoro, kie loĝas la instruisto?

-Kiu?

-Varga Bertalan, la historioinstruisto.

-En la strato Ady, sed li ne estas hejme – li respondis malafeble – Li forvojaĝis al Londono.

Tiu ĉi informo malgajigis Emerikon. El la alia angulo de la lando li vojaĝis vane. Kion nun li faru en tiu ĉi fremda vilaĝo?

Tion vidante la drinkejestro kompatis lin.

-Ĉu vi venis al la sinjoro instruisto?

-Jes – li diris malgaje.

-Ĉu vi deziras tranoktejon?

-Estus bone, ĉar mi ne scias, kie dormi.

-Sinjoro, se vi akceptas, tiam mi volonte helpas al vi. Ĉe mia bofrato vi povos tranokti. Li loĝas en la najbaro. Mi tuj gvidas vin tien.

Li turnis al la proksima duonebrulo:

-Józsi, la sinjoron mi nun gvidas al mia bofrato, ĝis tiam atentu la ordon. Tuj mi revenos.

Tio iom tranviligis Emerikon kaj sekvis la drinkejestron.

Ili longe frapetis sur la pordo, ĉar la elektra sonorilo ne funkciis. Post longa frapado mezaĝa, hirta viro ekaperis ĉe la pordo, kaj mire demandis:

-Kio okazis?

-Bofraĉjo, ĉi viro serĉas tranoktejon. Ĉu vi povus helpi al li?

Emeriko senhezite rapidis diri:

-Kompreneble mi ne deziras senpage. Mi volonte pagos.

La bofrato larĝe malfermis la pordon kaj signis, ke li enpaŝu. La drinkejestro restis ekstere kaj diris:

-Mi devas reiri, ĉar mi lasis al Józsi la drinkejon.

Ili deziris unu al la alia bonan nokton kaj la drinkejestro foriris.

Emeriko restis sola kun la bofrato, kiu ne estis tro parolema. Li silente montris la ĉambron, kiu estis bele instalita per la plej modernaj mebloj.

La viro ne longe restis kun Emeriko. Li diris bonan nokton kaj eliris el la ĉambro.

Li restis sola. Nun kion fari? Li venis tien ĉi vane. La instruisto forvojaĝis al Londono.

Kial li ne telefonis al li pri la vojaĝo?

Li ne komprenis, kio okazis?

Ĝis mateno li elpensos ion, kaj eble post la dormo li estos pli saĝa.

Li rapide ekdormiĝis. Nokte li havis strangan sonĝon. Ekaperis maljunulo, kaj invitis al forlasita loko. Longe ili iris, ĝis alvenis.

Krom ili neniu estis tie. La maljunulo estis malparolema. Li apenaŭ diris ion, kial li invitis Emerikon al tiu ĉi forlasita loko.

Alveninte la maljunulo staris antaŭ granda roko. Sur ĝi estis strangaj signoj. Unu similis al kruco.

-Kio ĝi estas? – demandis Emeriko – Kial ni venis ĉi tien?

La maljunulo ridetante eklevis sian brakon kaj diris:

(-daŭrigota-)

Por infanoj

Lerneja ferio

Infanaĝe kiel geknaboj, ni ĉiam malpacience atendis la lernejan ferion. La lastaj tagoj tre, tre malpacience pasis kaj kiam alvenis la lasta horo, ni feliĉege elkuris el la lernoĉambro, ĉar antaŭ ni estis la tuta somero.

Kiom bonege estis vekigi alitage la unuan tagon de la ferio. Ni ne devis iri al lernejo kaj nin atendis la senzorga ludo.

Tiam eble ankau la suno brilis pli bele kaj tiu ĉi granda libereco tute ravis nin.

Pasis multaj jardekoj, sed tamen ankau nun mi gaje rememoras pri tiuj belegaj someroj.

Mi envias la nunajn infanojn. Kiom bone estus denove kuradi kun ili, vagadi en bonodoraj arbaroj aŭ aŭskulti la pepadon de la birdoj.

Se ankoraŭfoje povintus esti infano, mi estus la plej feliĉa homo sur la terglobo.

Mi nur nun komprenis, antaŭ multaj, multaj jaroj ni estis ege riĉaj. Tiun ĉi riĉecon oni ne povas mezuri per mono. Ne ekzistas juvelo, kio superus eĉ nur unu momenton de tiuj ĉi jaroj.

Vane oni havas monon, tio sento ne estas aĉetebla. Tion oni devas travivi kaj por ĉiu tio signifas tute alian.

Restis por mi nur la memoro.

Se mi fermas miajn okulojn, tiam denove mi vidas tiujn admirindajn, neforgeseblajn tagojn kaj per miaj oreloj mi aŭdas nian gajan ridon.

Ho, se mi neniam devus malfermi miajn okulojn, tiam tiu karega travivaĵo ĉiam estus kun mi kaj de tempo al tempo mi travivus tiujn belajn somerojn.

Ankaŭ la nunaj someroj estas belaj, sed jam malaperis ĝia ĉarmo.

Mi mesaĝas al ĉiu infano, kiu nun feliĉe ĝuas la lernejan ferion: Eluzu ĉiun momenton de ĉi tempo kaj dolĉigu la tagojn kun multe da ludo kaj amuzo! Forgesu la malĝojon, ĉar tiuj ĉi someroj estos la plej belaj en via vivo.

-Onklo Adalberto-

